# *Asertas Rusio ke ili posedas la vakcinon kontra? la Covid-19*



Moskvo, jul 21 (RHK) Rusio diras ke ilia vakcino kontra? la Covid-19 havis favorajn rezultojn kaj pretas por esti uzata en la elimino de la infekta malsano.

La? la unua vicministro de defendo de Rusio, Ruslán Tsalikov, la unua vakcino kontra? la nova kronviruso kreita de militaj kaj sciencaj fakuloj de la nacia centro de esploroj epidemiologiaj kaj mikrobiologiaj de Gamaleya, estas preta.

"Jam oni faris finajn esplorojn pri la rezultoj de la provoj gviditaj de niaj specialistoj kaj sciencistoj de la nacia centro de esploroj", asertis ?i-lunde Tsalikov, aludante la klinikajn elpruvojn en la milita hospitalo Burdenko de Moksvo.

La rusa ministro anka? parolis pri kelkaj sukcesoj atingitaj dum la kompleksa procezo. "En la momento de la elhospitali?o, ?iuj volontuloj senescepte, evoluigis imunecon kontra? la kronviruso kaj fartis bone. Tial, la unua nacia vakcino kontra? la nova infekto pro kronviruso, pretas", li insistis.

La? Tsalikov, la likva vakcino estas elpruvata en 43 volontuloj en la milita ?efa hospitalo de Burdenko kaj oni faras elprovojn pri la vakcino pulvorigita en la Universitato de Medicino de Sechenov, anka? en 43 volontuloj, raportis HispanTV.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/229182-asertas-rusio-ke-ili-posedas-la-vakcinon-kontrau-la-covid-19

Radio Habana Cuba